LEG

La «Espéranto-Gironde» Informilo

OKTOBRO 2015




N° 144

# Speciala numero




# La KOMPANOJ en la Lilla UK



Raporto de Marcelo REDULEZ (fine de aŭgusto 2015)

**La Kompanoj 2015 : longaj preparadoj sed kiaj kolektivaj sukcesoj!**

Vi komprenu, ke ne eblas resumi la partoprenon de La Kompanoj en la 100a Universala Kongreso de Lillo sen aludi pri la pli fruaj du jaroj. De somero 2013 ĝis somero 2014 necesis aktualigi la repertuaron de nia trupo. Celante animi surstratan kunkantadon kun neesperantista publiko kaj la nacian vesperon de la UK, ni prioritatigis tradukojn de famaj francaj kanzonoj. Kaj se ilin ni ne trovis en la jam ekzistanta E-trezorejo, do ni mem tradukis aŭ instigis tradukrondon por varia, plaĉa, senchava repertuaro. Ankaŭ necesis certiĝi pri kerno de muzikontaj kaj aktorontaj volontuloj, kiuj portos la projekton proponitan al la organizantoj de la UK. Al FaMo (Fabrice Morandeau) kaj Marcelo Redulez, la instigantoj, unue blinde aliĝis Bernardo Legeay (suzafono) kaj Flora Markov (profesia aktorino). Rapide alvenis ankaŭ kvazaŭ spontanaj apogoj de Muriel Lefort (partituroj + kantado), Klodin' Pomirol kaj Betty Legeay (kritikaj teknikistinoj). Kaj tuj kompletigis la fundamentan bazon Janine Dumoulin (kritika korektantino + kantanta aktorino) kaj Yannick Dumoulin (retejo + kantanta aktoro) plus Morine Stride (lirika sopranino) kaj Isabelle Diaz (piano).

Por tia projekto necesas ankaŭ buĝeto. La Kompanoj estas trupo de loka grupo Esperanto-Gironde, kiu decidis parte financi la vastan projekton. Neniun monon ni ricevos de UEA. Nenova sinteno de tiu asocio rilate artan programeron. Pripensinde, ĉu ne? Feliĉe la LKK per kontrakto transdonos 1500 eŭrojn printempe kaj 1500 eŭrojn post la UK por kompensi diversajn kostojn ligitajn al transportoj, materialoj, kopiadoj, ktp.

La repertuaron fine decidis la unuaj kanzonstaĝanoj en Artigo-apud-Bordozo en oktobro 2014. Tie partoprenis tridek kvar geesperantistoj. Notindas la jama engaĝiĝo de Fransoazo Noireau kun ŝia violono kaj Pjer Buvje (gitaro kaj kontrabaso) kaj, ke sume dek ok el la tieaj nomoj retroviĝos sur la scenejo aŭ en la kulisoj en Lillo. Gravas tiu rapida larĝa aliĝo de kantemuloj al la projekto. Ili spegulas geografie sed ankaŭ sociorigine larĝan panoramon; do jen homriĉiga projekto!

De marto ĝis julio 2015, krom en Le Mans kaj Bordozo, FaMo kaj Marcelo animas kanzonrendevuojn en Châlons-en-Champagne (51), Gray (70), Dijon (21), Limoges (87), Gresillon (49), Bouresse (86), kaj FaMo sola ankaŭ en Tours (36), Angers (49), Nantes (44), Fontaine (38). Pli ol du cent geesperantistoj kunkantante malkovras la repertuaron. La partituroj preparitaj de Muriel Lefort kun la tekstoj estas je la dispono de ĉiu interesato. Projekciita lumbildaro kreita de Marcelo kaj Klodin' helpas

sentigi la emociojn kaj la etoso ĉie varmiĝas, kiam la akordiono de FaMo reliefigas la vortojn. Dum tiuj diversaj renkontoj aliaj kantemuloj aliĝas al la trupo. Tamen grava ŝtupo haltigas la entuziasmon de multaj: por kunkanti sursceneje, necesas parkeri dekon da kanzonoj. Jen streĉa laboro por tiu, kiu ekzerciĝas kaj hejme provadas sola. Sed Yannick, kreante la retejon de La Kompanoj - http://lakompanoj.free.fr/ -, disponigas ĉiun bezonatan materialon; kaj ĉio senpage! Fine Pjero Libbrecht kompletigas la muzikantaron per sia gitaro. Kvankam novaj voĉoj aliĝas, kiel ofte mankas viraj, basaj; tamen tio tute ne gravas por ni. Esence ni plezure kune kantu!

Ja ni restas amatoroj, kaj la defio muziki aŭ/kaj kanti en koncertejo antaŭ 1500 personoj vekas streĉon, kiu akompanas nin pli kaj pli forte. Sed ankaŭ antaŭ tio, nia kolektivo prezentas sian fortan unuecon kaj la trupo, serene, enkulise pretiĝas en la lastaj minutoj.

Nia trupa riĉeco ebligis prepari tre varian programon por tiu spektaklo «Granda ĵak inter la gigantoj»: jen tradiciaj muzikoj, jen klasikaj lirikaĵoj, jen Brel-juvelaro, jen bunta kaj parfumita kanzonbukedo kun entuziasmaj Kompanoj. Ni ĉiuj fieras kunĝui kaj partigi kun la publiko nian komplicecan vivĝojon. Tre rapide la publiko sentigas sian aprobon kaj resendas al ni kunkantadon, ritmajn manfrapojn kaj varmajn aplaŭdojn; jam senhezite dum la enkonduka parto kun *La esper' senlima* kaj *La parizano*.

Bonvenigante per esperanto la kongresanaron en sia naskiĝurbo, Naturamiko, loka giganto (4,50m), surprizas ĉiujn regulajn UK-anojn, kiuj okaze de nacia vespero ofte spektas (tro) folklorajn dungitajn danc- aŭ kant-grupojn, kiuj sin esprimas en sia kutima lingvo. Hodiaŭ vespere, neniu enuos. Io nekutime okazas! Kaj ĉiu ekfrandas tion jam de la komenco... ĝis la fina fino! Vera aktiva aktoro, iranta, prezentanta kaj kantanta, Naturamiko fariĝos la plej ofte fotita kongresano, starante jen sursceneje, jen en la halo dum la tuta semajno. Li enkondukas la spektaklon aludante pri sia regiono, la esperanta historio (Bulonjo 1905) kaj monologe aŭ dialoge kun Flora kaj Marcelo plenumos ĉiujn interkantojn. Li invitas al vojaĝo tra Francio dank'al muzikoj kaj kanzonoj.

Frambo Carrieu (diatona akordiono) kaj Gilbert Darrieŭ (fluteto kaj Tuntuntamburo) kunludas tradiciajn dancojn ĉi okaze kun Fransoazo (violono): unua parto de la vespero. Sur la mapo ili vojaĝigas la publikon de nordo sud-orienten al Provenco, poste okcidenten al Bretonio, orienten al Alzaco kaj sud-okcidenten al Pireneoj antaŭ ol reveni al Lillo. La verda vojo fine montras ŝercan stelon okulumantan al la publiko!

Mor*l*za, kies KD-on ni ricevis ĵus antaŭ ol forveturi al Lillo, lirike kantas la amon: jen la dua parto. La registrado de tiu KD estis utila al Morine kaj Isabelle ankaŭ kiel preparlaboro por ilia interveno matene dum la oficiala malferma ceremonio. Morine kaj Isabelle kutimas kune koncerti, tamen neniam okazis antaŭ tiel multnombra

publiko. Jen *Plezur' de am'* kaj *La vojoj de l' amo* kaj jen *La rozo* de Armanda McBroom el la angla.

Brel kiel trian parton anoncis la titolo de la spektaklo «Granda Ĵak inter la gigantoj». La deklamado far Janine de *Ĉi ular'* laŭ propra traduko denove surprizas la publikon, eĉ la francojn, kiuj konas la kanzonon. Kaj la efiko estas potenca. Kaj kiam FaMo ekkantas sian parton, ĉiuj sentas denovan kroman ŝtupon saltitan. Ni ne povis imagi kiel sorĉa estos tiu altnivela FaMaĵo. Ja li argumentas, ke la tekstoj de Brel estas riĉaj, ke la esperanto-tradukoj bele spegulas la originalojn, sed li perfekte interpretas kaj liaj severaj postuloj al siaj akompanantoj elmontras majstran Brel-tempon en esperanto. Sin sekvas *La plata lando, La Flandrinoj, Amsterdamo, La strebo*. Apoteoze! La Kompanoj enkulise sentas korpajn tremojn kaj kiam siavice ili kunkantas *Kiam restas am' nur* ili ne plu timas riski rompi la magion, ĉar ili flosas sur la ondo de la deziro perfekti ĉiujn emociojn de tiu apogea kresĉenda kanzono. Dankegon al FaMo, kiu ebligis al ĉiuj Kompanoj travivi tiun elstaran programeron partigitan kun ensorĉita publiko kunkantanta dank'al la versoj kaj kisbildoj sur la ekranego.

Post tiaj fortaj emocioj necesas pli malpeza sceno: la transdono de esperanta diplomo al Naturamiko cele al definitiva agnosko de li, kiel aŭtenta esperantisto. Kaj tiun rolon tre amuzserioze transprenis Christer Kiselman mem, aktuala prezidanto de la Akademio de Esperanto! La kompliceco de tiu gravulo inter ni kaj liaj reagoj antaŭ, dum kaj post la spektaklo, emas min enkalkuli ankaŭ lin kiel Kompanon kaj ne nur kiel eksteran invititon. Vi legu pri tiu eventa interveno ankaŭ en lia oficiala raporto pri la UK en lia cirkulero al akademianoj.

Finfine, post unu horo, la tridekopa trupo aperas sursceneje por la lasta komuna parto. Dum preskaŭ tuta dua horo La Kompanoj transdonas al la publiko emon kunvivi ĝojon, bonhumoron, spitemon, ŝercemon sed ankaŭ pripensigajn emociojn dank'al siaj ilustritaj kanzonoj: *Mina mond', La kongresurboj, Estas ĝoj' verda, Lili, Volas mi, La nord-irlanda balado, Tuj la kompanar',* kaj fine (ĉu jam?) *Kisu min ankoraŭfoje.*

Antaŭ la biso ni ne forgesas danki la teknikistojn, kiuj tre diligente, kompetente kaj talente reliefigis nian prezentadon. Ili filmas la spektaklon kaj samtempe projekciadas ĝin rekte el la Zamenhofa salonego al la salonoj Hodler kaj Lapenna (po 750 sidlokoj preskaŭ ĉiuj okupitaj). Ni ankaŭ informas pri la morgaŭa rendevuo por surstrata parado kaj surplaca kunkantado. Sed multaj ne atendos la morgaŭon por esprimi siajn mirojn, agrablajn surprizojn, gratulojn kaj dankojn. Tuj post la spektaklo multegaj plezuraj mesaĝoj atingas ĉiujn el ni. De ravitaj anonimuloj, de konatoj, de eminentaj personoj, inter kiuj Xavier Dewidehem, prezidanto de la LKK, kortuŝita laŭdanto…

Kaj la morgaŭon la sukceso pluiĝas. Jam matene multaj homoj salute gratulas, dum multaj aliaj gratule salutas… Bedaŭrinde la venta kaj pluvema vetero malebligas al Naturamiko veni kun ni sur la placon de la teatro antaŭ la operejo. Sed La Kompanojn tien akompanas ĉirkaŭ du cent buntaj kunkantontoj. Muzika parado kun dulingva banderolo «Esperanto, giganta paŝo por la homaro – un pas de géant pour l'humanité» laŭiras la stratojn pasante antaŭ la stacidomo. La ĝojan bonhumoron salutas pasantoj kaj aŭtomobilistoj. Sur la placo jam atendas nin vasta grupo. Antaŭ ol komenci estas disdonitaj la preparitaj tekstaroj. Unue cent kvindek ekzemplerojn mi elsakigas dirante «Po unu por kvar kunkantontoj!». Fulmrapide de mano al mano la tuto montriĝas ne sufiĉa. Post la dua kanto sub insisto mi transdonas kroman kvindekon. Mi celis konservi kelkajn por la pasantoj, kiuj preterpasus nin iom poste. La lastan kvindekon mi do transdonas al personoj, kiuj rande informas al neesperantistoj pri la evento. Montriĝas pluraj interesatoj, volontuloj, kiuj provas kunkanti kaj plezure ricevas la tekstaron. La suno timeme aperas inter grizaj nuboj kaj la vento blovas malvarmetan aeron, tamen la etoso tiel belas, ke ĉirkaŭ tricent personoj restados ĝis la fina biso. Tiun eventon filmas la regiona televido, kiu prezentas bonan reportaĵon pri la UK en sia tagĵurnalo. La Kompanoj rajtas fieri pri tiuj sukcesoj. Gratulojn ili ĉiuj individue sed ĉefe kolektive meritas pro siaj prezentadoj.


Delonge maturiĝis la ideo intime ligi la internacian asocion de la Natur-Amikoj kun La Kompanoj. Kaj jen ideala konkretiĝo. Maryvonne Rincent, eminenta aktivulino en la franca federacio de la Natur-Amikoj, organizas kanzon-semajnfinon en Châlons-en-Champagne kaj ŝi instigas sian fraton Denis, profesia dokumentaristo (Silène productions), produkti reportaĵon pri La Kompanoj en Lillo. Vi spektu tiun filmeton, belega memoraĵo sur la reto:

https://www.youtube.com/watch?v=DGOaD9q55mg

Kaj nun? Mi sincere esperas, ke post tiu Lilla sukceso FaMo, Mor*l*za kaj Flora estos vokataj por koncertoj aŭ teatraĵoj dum diversaj eventoj. Kaj La Kompanoj retroviĝu de tempo al tempo por kunkanti kaj partigi tiun plezuron kun pubiko! Jen esperantista, jen surstrata!








La Kompanoj, el preskaŭ tuta Francio, preparis la spektaklojn de la UK de Lillo per staĝoj tra la tuta lando…











## La Kompanoj en Lillo

Jam de du jaroj La Kompanoj preparis la Universalan Kongreson 2015 en Lille. Iom post iom la projekto siluetiĝis kaj monaton post monato alprenis pli konkretan formon.

Ĝi estis duparta: unue la Nacia vespero, kaj due la surstrata kunkantado. Ambaŭ partoj estis samtempe preparataj. Kaŝita parto de la preparado estis la traduko aŭ adapto de la elektitaj kanzonoj. Pri tio laboris pluraj homoj dum du plenaj jaroj.

Pri la preparo al la sustrata kunkantado jam aperis en LEGI pluraj artikoloj kaj raportoj tra la numeroj de la pasinta jaro: la unua ĝenarala staĝo okazis en oktobro 2014 (post pluraj sine de Esperanto-Gironde mem en 2013-2014). Sekvis pluraj aliaj tra tuta Francio. La lasta, en pasinta julio, nur du semajnoj antaŭ la spektaklo, arigis tridekon da kant- kaj muzikemuloj – la definitiva trupo! Ĉiufoje, sub la gvidado de FaMo, oni ne nur plibonigis la kantadon mem, celante la plej ĝustajn notojn, la plej precizan ritmon, sed oni ankaŭ laŭokaze modifis kelkan frazarânĝon en iu teksto, tial ke la efekto estu plej belsona.

Por la spektaklo de la Nacia Vespero, Marcelo laboradis dum tagoj kaj noktoj por ĝin krei kaj organizi. Li planis la diversajn erojn, t.e. la paroloj de la giganto Naturamiko, reĝo de la vespero, la prezentado far Flora kaj Marcelo (kiel ia « ruĝa fadeno »), la folkloraj muzikoj, la lirikaj kantoj de Morine kaj Isabelle, la kanzonoj de Brel far FaMo kaj Janine, kaj la elekto de «bukedo» da francaj kanzonoj far la koruso. Sed li ankaŭ verkis la tutan lumbildaron, kiu akompanis ĉiun parton de la spektaklo. Kaj Klodin' prie ekzerciĝadis. Ankaŭ por tiu spektaklo estis plibonigaj diskutoj pri la kantoj. La lasta vorto pri *La Plata land'* estis dirita fine de junio!




Kaj iun tagon... ĉiuj sin renkontis en la kongresejo. La tago de la spektaklo tutsimple alvenis... Nu, karaj legantoj, legu la sekvon tra la atestoj de la partoprenintoj... kaj de la publiko!

Janine



FaMo

Karaj gekompanoj,

Estis ĝojige travivi tiujn kanzonaventurojn kun vi kaj kun tiom da spektantoj dimanĉe vespere sursceneje, kun tiom da kunkantemuloj lunde posttagmeze kaj eĉ vendrede matene surstrate. Mi esperas, ke ĉiuj estis kontentaj kaj ke, kiel mi, vi nenion bedaŭras.

Sen La Kompanoj mi ne povus travivi tian gigantan surscenejan prezentadon dum kiu mi spertis unu el la plej fortaj emocimomentojn el mia tuta vivo. Mi vibradis, mi estis skuita tutkorpe, mi ploris eĉ kantante, danke al la ĉeesto de vi ĉiuj, de ĉiuj teknikistoj, de ĉiuj spektantoj. Dividi tiajn fortajn spektaklajn emociojn estas tio, kion mi plej ŝatas en la vivo.

Mi volas dankegi ĉiun el vi, kiu multe laboris por lerni kaj parkerigi la tekstojn, ĉiun muzikiston pro sia diligenteco, Marcelon, kies taskojn ne eblas nombri, nian gigantan voĉon Yannick ankaŭ kaj ĉefe pro la retejoprizorgado, kaj Klodin', kiu multon faris en la ombro kaj sen kiu Marcelo eble ne povus tiom fari. Mi ricevis multegajn gratulojn kaj laŭdojn, kiujn mi ŝatus memori laŭvorte por plene dividi ilin kun vi ĉiuj. Mi fine volas danki vin pro via pacienco kaj via indulgo ĉar mi konscias, ke mia vulkana karaktero kelkfoje tro paroligas min kaj ke pacienco mankas al mi por bone gvidi tian muzikan laboron.

Kiam naskiĝis la ideo de surstrata kunkantado, mia celo ne estis nur tion fari en Lille. Do por mi, la aventuro nur komenciĝis. Ĝi brile komenciĝis. Sed mi ŝatus daŭrigi kaj kreskigi ĝin. Kaj vi?

Kun sinceraj amuzikaj kisoj,

FaMo





Klodin'

Mi malkovris la lokon de la kongreso sabaton de la malantaŭa flanko ĉar ni alvenis kun la gepatroj de Naturamiko por ekkoni kie kaj kiel la giganto eniros la kongresejon.

La unua ideo starigi lin ĉe la ĉefa enirejo jam de sabato matene por akcepti kaj bonvenigi ĉiujn devis esti forlasita pro tro da vento kaj risko de pluvo. Jen, de la komenco mi konscias, ke prognozo de vetero ĉiam gravas ankaŭ por Naturamiko. Kvankam giganto, li estas fragila kaj malstabila. Poste dum la tuta semajno liaj gepatroj regule traserĉos la veterprognozojn kaj paralele telefone rilatos kun la naturamika skipo, kiu por ĉiu translokigo de Naturamiko speciale venis. Ne imageble al mi konscii antaŭe, ke por estigi kaj movi lin necesas ses personoj... la piedoj, ok brakoj, la cerbo, okuloj kaj voĉo. Nekonata skipo, kies anoj atentas kaj fidas unu la aliajn kaj sekrete agas. Dankon kaj gratulojn al ili, des pli ke ili ne surloke loĝas kaj tage laboras.

Dimanĉon mi konstatis ankaŭ efikon kaj profesiecon de la teknika skipo en la ĉefa salono, kie ĉiuj kompanoj renkontiĝis posttagmeze por lastaj provaĵoj kaj pretigo de la sonsistemo. Persone mia streso unue pligrandiĝis kiam mi spertis la daŭron de la laboro. Mi timis, ke ni ne estos pretaj akurate por la vespero. La elektra instalaĵo estis longa kaj laŭ nia sento tro longa. Sed en la kulisoj, kie mi estis kun la teknika skipo, mi konstatis, ke la teknikistoj ne amuziĝas. Ili malnodis metrojn kaj metrojn da kabloj antaŭ ol konekti ilin. Pacience eĉ se foje ili grumblis kontraŭ la antaŭa uzanto, kiu malbone ordigis la materialon. Ĉiam afablaj kaj ridemaj ili provis trankviligi min (sen tro da sukceso, tempo kuris...) kaj klarigis al mi sian taskon.  Ĉiu ano en la skipo specialiĝas pri preciza fako. Tre interesa tiu malkovro de laboro, pri kio mi nenion sciis. Laŭ mia vidpunkto ĉiuj kabloj aspektas similaj. Tamen post interŝanĝo kun la muzikistoj ekzemple ili elektis konekti iun kablon anstataŭ alian por pli efike respondi al la postuloj. Ju pli multaj estas la surscenejaj partoprenantoj, des pli komplika estas la instalado de la sonsistemo. Kaj pri tio ni tute ne konsciis.

Finfine la instalado de la videosistemo okazis fine de la posttagmezo. Denove aliaj surprizoj ŝprucis, preskaŭ solvitaj post pluraj provoj kaj klopodoj. Mi poste devis kiel eble plej bone kontroli ĉiujn bildojn kaj Marcelo lastminute reordigis kelkajn enpaĝigojn fuŝitajn, kiam ni devis intersanĝi la du komputilojn (similaj sed malsamaĝaj!) Jen misteroj de la teknikaĵoj!

Denove dum la vespero mi spertis la efikon kaj reagkapablon de la kvin disigitaj teknikistoj, kiuj telefone kunordigis sian laboron, elektante la taŭgan kameraon por kadradi kaj sonorigi ĝustatempe ĉu la muzikistojn, ĉu la solistojn, ĉu Naturamikon, ĉu la ekranon, ĉu la salonon...

Malantaŭ la kurteno mi vidis nenion el via prezentado. Eĉ se la teknikistoj disponis pri ekranoj, kiuj montris la bildokaptadojn. Mi ne havis tempon rigardi. Mi agis nur laŭ la sonkaptado, kiun mi aŭdis. («Tuntun» mi ne aŭdis). Bonŝance dum la vespero ĉio glatis (preskaŭ).

La spektantoj konsciis pri neniu problemo kaj nur bonaj kritikoj atingis nin. Uf! Gratulojn al ĉiuj. La veto estis aŭdaca tamen ni sukcesis.

Klodin’



Klodin’ teknikistino




La laboro de Klodin’ : la lumbildaro

**ILI PARTOPRENIS!...**
**REAGOJ DE KELKAJ EL LA KOMPANOJ POST LA UK**



Lucia

Saluton!

Unue mi ŝatus danki ĉiujn, dank’ al kiuj tiu projekto sukcesis, certe Marcelon (lia ĉiama bonhumoro kaj atento al ĉiu) kaj Famon (mi tute ne rimarkis vian mankon de pacienco), kiu tiel bele kaj emociplene interpretis la kanzonojn de Brel (tiu-ĉi povis nur aplaŭdi se li aŭdis vin!), sed ankaŭ ĉiujn instrumentistojn, sen kiuj ni la koruso ne ekzistintus, ĉar vi vere elportis nin per via energio kaj via sperto.

Mi jam partoprenis en diversaj bonegaj koncertoj kaj spektakloj, inter kiuj kelkaj restos en mi dum mia tuta vivo, sed ankaŭ ĉi-tiu restos en mia memoro. Estis momento de graco, de partigo inter ni ĉiuj kaj inter ni kaj la publiko.

Dum mi preskaŭ sola atendis en la silento de la kulisoj venis neatendite la filmisto demandante al mi, kiel mi sentas min... Sen pripensi mi kun granda miro respondis: «Bone, mi estas feliĉa kanti esperante antaŭ tiel granda publiko kaj konigi al ili belajn francajn kanzonojn.»

Jes, tiel estis la etoso, ni estis feliĉaj, la publiko estis feliĉa (eĉ se certe estis kelkaj ĝoj-fuŝuloj, sed domaĝe por ili!). Kion peti krome?

Ankaŭ la du kantadoj tra la stratoj kaj sur la placo estis tre ĝojaj. Mi ne scias, ĉu multe da neesperantistoj demandis pri nia agado, sed mi mem kaj aliaj diskutis kun preterpasantoj, kaj konvinki kaj ŝanĝi la mondon fariĝas nur paŝon post paŝo, de giganto aŭ de nano, la ĉefa afero estas antaŭeniri, ĉu ne?

Tutkore,

Lucia, preta por aliaj aventuroj en esperantujo.



Frambo, Lucia, Gilbert



Nicole

Saluton al ĉiuj, karaj korgigantaj geamikoj,

Kelkfoje dum staĝo, oni kunludas la demandon «Rakontu pri viaj unuaj fojoj»... Por mi, ĉi UK-semajno donis multajn respondojn al tiu demando.

- La 100a Universala Kongreso en Lillo estas mia Unua!
- Kunkantadi mi ne kutimas, krome parkerigi tiom da kanzonoj!
- Kantadi sursceneje antaŭ tiom da homoj el tiom da landoj... granda evento!

Ĝui kun vi neforgeseblajn momentojn!...
Do post tio, kion diri! Vi alterne reagis kun emocio kaj kun kortuŝaj vortoj, certe pli bone ol mi.

Kiam, dum la vojaĝo en Rumanio, Marcelo prezentis al ni la projekton «kanti surstrate dum la UK en Lillo», mi jam decidis, ke mi organizos min por partopreni.

Ne ĉiam facile sed… Finfine grandega spertaĵo!

La nacia vespero de la 100a Universala Kongreso certe restos en mia memoro kiel neforgesebla aventuro, ankaŭ la surstrata kunkantado… amuzplena, emociplena, poeziplena!!! Granda okazo por ankaŭ montri la intereson de Esperanto.

Dum tiu jaro, mi ŝatis renkonti aliajn geesperantistojn, babili, krokodili (jes… kelkfoje nur!), fakte kune, kun komuna projekto, tiu okazo estis senegala. Mi volas hodiaŭ gardi en memoro nur la belaĵojn kaj ne tro reveni al la malbelaĵoj, kiujn ĉiuj jam rimarkis: niaj miskantaĵoj pro nesufiĉa parkerigo de la kanzonoj aŭ pro manko da provludo, la longa tempo atendante la sonprovon, dimanĉon posttagmeze, la negativa streĉo de kelkaj inter ni, la organizado de UEA... ne gravas.

Mi sendas specialan gratulegon, al Marcelo, kiu havis ĉiam fidon en ni kaj pro la mirinda laboro, ankaŭ al Klodin' la ombra virino, kiun mi gratulas pro ŝia longa kaj interesa retmesaĝo kaj ankaŭ al Betty kun ŝia nepre necesa mano, kiu gvidis nin per la suflor-legilo!

Mi tutkore gratulas FaMon pro lia miriga ĉeesto, lia «vidpovo» de la tuta grupo kaj plurfoje dum la spektaklo li hirtigis la haŭton, aparte per *La Strebo*!

Emociajn gratulegojn ankaŭ al Morine, ŝia *Rozo* donis al mi tremetojn, kaj al Janine, de kiu min mirigis pro la longa teksto, kiun ŝi parkerigis.

Bravegojn ankaŭ al la plej juna inter ni, Flora, pro ŝia profesieco kaj ŝia sursceneja talento dum *Ĉagrenegoj*.

Sen forgesi la muzikistojn, sen kiuj oni ne sukcesus bone kanti, kaj ankaŭ la «familion» de la giganto kaj ties belan voĉon!

**Ĉiuj kune kontribuis al la sukcesego de la nacia vespero kaj efektive la aventuro nur komenciĝas!!**

Eble mi havos la okazon venontjare proponi al vi partopreni feston en malgranda vilaĝeto en nia Berio, okaze de eŭropaj junularaj renkontiĝoj (sabate ĉirkaŭ la 14a de julio).

Ŝajnas, ke ni povus montri al gejunuloj de kelkaj eŭropaj landoj la valoron de Esperanto, ne nur per budo sed ankaŭ sursceneje! Ĉu ne?

Do oni vidos poste kun Nathalie kaj Maryvonne Houviez (la prezidantino de nia klubo).

Ĝis,
Gigantajn kisojn al ĉiuj.
Nicole ....aŭ Nikol'



Maryse, Muriel, Jean-Pierre, Nicole



Martine

Karaj,

Mi renkontis Marcelon kaj Famon dum la kongreso de SAT en Dinano, en augusto 2014. Marcel prezentis la projekton kanti surstrate dum la UK de Lille. Tuj, tiu projekto allogis min. La elekto de la kantoj plaĉis al mi. Mi persvadis Elisabeth-on partopreni en la staĝo de Grezil-jono en aprilo. Poste, mi organizis unutagan staĝon en mia urbo Fontaine por la rodanalpaj esperantistoj. FaMo surprizis nin per sia partopreno.

Kiam mi engaĝiĝis en tiu projekto, mi intencis nur kanti surstrate en Lille sed finfine mi plezure partoprenis en la nacia vespero. Escepte de kelkaj frustraĵoj (tro da tempo dimanĉe senefike por mi, mi volintus spekti tiel belan nacian vesperon, mankis tempo por renkontiĝo inter ni post la spektaklo!), tiu vespero estis la plej granda momento en la UK por mi, kompreneble!!! Neniam mi bedaŭris mian penon! Tre interesa sperto. Bela kaj varma etoso. Originala maniero partopreni en la UK. Ĉiuj miaj amikoj kaj kunuloj deziris diri al mi sian plezuron pro nia spektaklo.

Lundon posttagmeze, ĉiuj kantis kaj muzikis senstreĉe, entuziasme. Granda plezuro por mi, kanti kun multaj homoj ĝoje.

Dankegon ĉefe al Marcelo, FaMo, Klodin' kaj al ĉiuj partoprenintoj por tiu granda kaj bela aventuro!

Amikege,

Martine



Martine, Janine, Flora



Nathalie

Saluton,

Pro malfruo, ŝajnas al mi ke estas nenio por aldoni al viaj diversaj belaj kaj plenplenaj raportoj. Do jen, nur akrostiketo por la kompanoj.

**D**ankegon rajtigi min partopreni,
**A**grablajn tagojn ĝuis mi,
**N**ova sperto tio estis.
**K**ion pli?
**E**mocio!
**G**iganta plezuro!
**O**vacio de ĉiuj, konataj aŭ ne,
**N**acia vespero estis granda sukceso!

**L**aŭdojn multnombrajn ni ricevis
**A**nkaŭ pro la surstrata kunkantado

**K**orajn dankojn mi nature deziras esprimi al:
**O**ra kaj admirinda viro, laborema kaj serena artisto,
**M**arcelo nomata;
**P**ostulema sed atentema artisto, kortuŝa kaj grandioza Ĵak,
**A**rtnomata FaMo;
**N**aturamiko, muzikistoj, Klodin',
**O**ficialaj kaj nepre necesaj anoj de La Kompanoj;
**J**en. Fino de bela aventuro aŭ komenco de bela historio?

Mi salutas ĉiujn,

Nathalie



Nathalie kaj Monique



Monika

Saluton al ĉiuj, karaj Kantkompanoj,

Kiam mi decidis partopreni en kantostaĝo en la kastelo de Gresillon...

Por mi, estis simpla deziro kanti...
estis spertaĵo...
estis tempapasigo...
estis malkovro...
ĉar mi absolute devas konfesi al ĉiuj, ke neniam antaŭe mi kantis...

Sed de kanto al kanto,
de tono al tono,
de Gresillon al Fontaine,
de Artigues al... scenejo de Lille!...

Vere, enparkerigi la kantojn!...
Mi forte akceptis tiun defion sed mia kapo fumis!!!

Finfine, mi ĉeestis en la Nacia Vespero apud la Giganto! KUN VI...

Dankegon al la Kompanoj!
pro via preparada laborego,
pro via afableco,
pro via pacienco,
pro via fido.

Estis tre bela aventuro.

Amike,
Monika



Muriel, Jean-Pierre,
Nicole, Monika



Maryse

Gekaraj,

Mi ĝoje kaj entuziasme partoprenis tiun aventuron kun «La Kompanoj» kaj la aliaj kantistoj.

Plie, mi vere ŝategus daŭrigi kaj kreskigi tiun ideon de surstrata kunkantado.

Respondante al Famo: tio ne estas «vulkana karaktero» sed kompreneble tute normala kaj profesia reago, ĉar vi deziras bonan spektaklon.

Dankegon al Marcelo, kiu havis la genian ideon surscenigi tiun spektaklon, al Famo, al la muzikistoj, kaj al Naturamiko.



Gigantajn amuzikajn kisojn por ĉiuj,

Maryse

Morine, Betty, Maryse, Muriel



Fransoazo

Saluton,

Mi havis tre bonan amplifadon (sonorizadon) kaj tio nepras aparte por la kordmuzikantoj.
Pardonon pro la 3 fuŝaj unuaj notoj de la unua popolmuziko.
Mi ricevadis/as plurfoje tage gratulojn kaj dankojn de esperantistoj. Ili emfazas:

- ke estis amuze
- ke estis emociige
- ke estis tute en Eo.

Roman Dobrzyński diris ke estis lia plej bona Nacia Vespero de 40 jaroj.
Katalin Smideliusz/Kovacs diris ke estis pli bone ol multaj profesiaj spektakloj, kiujn ŝi spektis.

Dankon al ĉiuj,
Kiset',

Fransoazo



Gilbert, Fransoazo

Gilbert kaj Frambo



Ĉu baldaŭ Zenitanoj? oni devas serioze elekti unu el la mult-nombraj manaĝeroj, kiuj kontaktis nin post la spektaklo!!!

Pli serioze, mi tre dankas la Kompanan Estraron, kiu instigis nin, kaj mi promesas lerni dufoje pli la kantajn tekstojn se feliĉe oni repartoprenos alian spektaklon!

Amike,
Gilbert




Mi feliĉas, kiam mi vidas la rezulton de tiu spektaklo! Pluraj homoj eĉ ne konataj diris, ke ili tre ĝuis la spektaklon! Mi notas ankaŭ, ke la etoso estis tre ĝoja kaj amika! La spektaklo rezultas de grandega volo, talento, laboro, ĉefe de Marcelo, Famo, Klodin', Muriel. Mi gratulas ilin! Sed ankaŭ ni devis strebi por par-kere kanti eĉ se ni mem ne estis spertuloj en Esperanta lingvo! Dank' al helpo de suflorlegilo ni sukcesis!

Mi estas preta, se mi devas denove partopreni, plu labori por pli bone koni la teks-tojn!

Amike,
Frambo



Gilbert kaj Frambo



Flora

Saluton karaj,

Dankon al ĉiuj por tiu aventuro! La skipa laboro estas ne ĉiam facila sed tre agrabla, des pli kun homoj tiom afablaj kaj sindonemaj!

La trupa laboro estas ege kortuŝa kaj emociplena kaj parte pro tio mi mem elektis tiun metion. Do mi tre ĝuis tiun travivaĵon!

Ankaŭ la surstrata komuna kantado estis kortuŝa kaj mi ĝin ŝategis!

Venis al mi ankaŭ pluraj homoj por gratuli, esprimante interalie sian ĝojon pro la elekto aparte trafa de la kanzonoj kaj de ĉiuj pritraktataj temoj.

Dankon pro la ebleco travivi tiujn momentojn! Kaj mi diras jes al venontaj kunlaboroj ☺

Gigantajn kisojn,
Flora



Marcelo, Flora



Janine

Karaj geamikoj,

Nu... revigliĝas tiom da sentoj!...

Dum la posttagmezo de dimanĉo la 26a, mi, kiel ni ĉiuj, atendadis, kaj havis la senton, ke ni ne estos pretaj, ĉar pli kaj pli aperadis, ke ni ne povos eĉ «germanece» provludi la spektaklon... Samtempe, tio ebligis (almenaŭ por mi!...) teni la realecon iom for, kvazaŭ temas nur pri ia sonĝo: ni ja estis sur tiu timiga grandega scenejo, sed por kio?... Ĉar ni nenion provludis aŭ kantis, ĉio ŝajnis daŭre nereala. Mi eĉ ne povis antaŭen imagi nin en la spektaklo. Iumomente, Flora flustris al mi, ke ni prezentos spektaklon iel improvizan... Nu... kial ne... Fakte, ni estas nur amatoroj.

Kiam komenciĝis la spektaklo, kiam la mallumo envolvis la salonon, kaj la lumoj krude malkaŝis la scenejon, mi, frostanta pro malvarmo (kaj pro antaŭtimo?), atendis en la ĝardena kuliso, apud la aliaj tieaj korusanoj. Mi trovis la voĉon de la giganto ege bela, ĝusta, firma, kun plej preciza prononcado, kaj mi tuj havis la impreson, ke tiu altkvalita komenciĝo estas plej favora aŭguro por la sekvo. Mi ne klare aŭdis la kunkantadon de la publiko, sed jam la Kompanoj venkis, kaj la intuicio de FaMo tute ĝustis: la publiko estis ja kaptita en nia ludo! Mi aŭde konstatis, ke la publiko ege ŝatas la folklor-vojaĝon tra Francio, ĝis la formo de la verda stelo sur la ekrano. La kantoj de Morine, kun Isabelle, pli ol neniam antaŭe premis mian koron kaj mi sentis entuziasmon kaj amon al la tuta homaro (nu almenaŭ al la tuta ĉeestantaro de la salono).

Kaj venis mia vico. Okazis tiam io neatendita kaj neniam antaŭe spertita. Mi sentis min iel duobligita (aŭ duonigita...). Parto de mi ludis, en tuta certeco kaj sekureco, kaj ŝajnis al mi, ke ne mi ludas. Fakte, la rolulo prenis la lokon, kaj mi gvidis ĝin, sciante, kion ĝi devas fari, kien ĝi devas iri, sen ia ajn maltrankvilo, kompreneble, ĉar ne mi ludis!... Mi ŝategis tiun impreson kaj plej bone sentis la tre specifan silenton dum la ludado. Mi ŝategis la diversajn emociojn de la rolulo, kaj la manieron, kiel ili atingis la publikon. Tamen ege surprizis min la aplaŭdoj, kiuj tondre sonis je miaj oreloj.

Mi apenaŭ havis la tempon alpafiĝi kun Flora (kiun mi ege dankas pro ŝiaj kuraĝigoj kaj trafaj konsiloj!) al la aktor-tualetejo por alivesti min, dum la tre protektema kaj efika teknikisto forprenis kaj poste remetis la kap-mikrofonon. Mi bedaŭras, ke tiel mi maltrafis la plejmulton el la kanzonoj de FaMo. Tamen mi povis ĝui lian interpretadon de *Amsterdamo* kaj de *La Strebo*, kiuj vere «najlis» min pro emocio.

Venis la 2a minkoncerna defio, t.e. la reveno surscenejen por la unua parto de *Kiam restas am' nur*. Mi esperis, ke mia voĉo estas kunfandata, kun tiuj de la aliaj korusanoj, sed ŝajnas, ke ne. Bonŝance, mi ne sciis pri tio! Mi sentis min parto de la tuta koruso, kaj tute sekure subtenita de la koruso kaj de FaMo.

Kaj venis la momento de la surscenejiĝo de la tuta koruso. Mi povis senti, ke la publiko aliĝas al niaj proponoj. La bildaro ja certe rolis en tiu aprobo. Tio aperis al mi interalie, kiam ni estis kunkantontaj *Lili*. La antaŭaplaŭdoj de la publiko ardigis min! Same mi preskaŭ ploris, kiam, dum la finaj (?) aplaŭdoj, mi malantaŭen iom turniĝis por spekti, kio aperas sur la ekrano, kaj vidis precize la omaĝon al la buĉitaj desegnistoj de Charlie-Hebdo.

Post la spektaklo, mi apenaŭ povis kredi, ke ĝi ja okazis... Regis iu nebula sento, mi ŝvebis sur nubo.

La reagoj, alparoloj de spektintoj en la sekvaj tagoj same surprizis min. Mi, per ili, komprenis, ke ni donis ja plej altkvalitan spektaklon, je la nivelo, kiun Marcelo celis. Ni ĝoje kaj bonhumore faris nian modestan laboron sur la scenejo, sed ĝi impresis. Ili alte taksis la nivelon, sed ankaŭ la elektojn: tuta konstruita spektaklo, kaj ne disigitaj eroj; ĉio donita ja en Esperanto. Ili bone sentis, ke ni estas ĝojaj kunludi kaj kunkanti. Pro tio, sendube, ili tiom multaj sekvis nin lundon posttagmeze.

La surstrata kunkantado estis alia neforgesebla spertaĵo: tiom da homoj, kiuj kunkantis, aŭ ĝoje aŭskultis (oni taksis la nombron pli ol 200)!... Kaj la malbela vetero iel obeis nin: aperis suno, kiam ni kantis al ĝi!... La etoso estis tiom ĝoja kaj gaja!... Jen Esperanto laŭvere!...

Vortoj certe ne ekzistas, por esprimi la dankemon enorman, kiun mi sentas al ĉiuj, kiuj ebligis la realigon de tiu freneza projekto, kaj aparte al Marcelo, kiu genie kaj sindoneme verkis kaj organizis la tuton, al FaMo, kiu pacience faris el ni konvinkan kantantan grupon, al Klodin', kiu majstre mastris la bildaron kaj la teknikajn aferojn!...

Mia nuna stato: Kvazaŭ min tiam trafus bombardo de lumpartikloj, kaj ilian brilon mi longtempe sentos en la interno de mi.

Janine



# Surstrata kunkantado kun La Kompanoj

**Marcelo Redulez**

Bedaŭrindas konstati, ke ĝenerale homoj, sed pli grave esperantistoj, malpli grupe kantas ol dum la pasinta jarcento. Nepras reaktualigi tiajn eksterordinarajn tempojn de kunvivado! En la jaro 2013, FaMo (Fabrice Morandeau) en Parizo kunĝuis sperton de senpretenda muzikgrupo, kiu disdonis kanzon-tekstojn al pasantoj kaj tiel arigis ĉiam pli kaj pli da kunplezurantoj. Li tuj sentis tie semon de evoluigebla ideo. La saman jaron somere en Madrido Marcelo Redulez ĉeestis samtipan animadon de Indignuloj dum SAT-kongreso. Tiuj du Kompanoj rapide akordiĝis kaj ekimpulsis adapton por Esperantaj eventoj. Unue krei repertuaron de francaj kanzonoj, kies melodiojn surstrate francaj preterpasantoj tuj rekonos kaj pretos kunzumi, kunkanti. Due prepari bonvolemajn esperantistojn, kiuj konsentos partigi tiujn spertojn formante kernon de la muzikantaro kaj kantantaro. Kaj post konfirmo de tiu bezonata kerna bona grupo, ek al publikaj prezentadoj.

La fina elekto de dudeko da kanzonoj, kies tradukojn La Kompanoj ĉerpis el jam ekzistantaj versioj aŭ kiujn ili speciale bakis, kolektive okazis en Bordozo dum la unua semajnfina kanzonostaĝo en oktobro 2014. Dum la sekvantaj vintro kaj printempo, dudeko da kanzonorendevuoj kolektis dise tra Francio entuziasmajn kunkantintojn. Krom Bordozo, Le Mans, Angers, Nantes, Tours, Limoges, Dijon, Châlons-en-Champagne, Toulouse, Fontaine apud Grenoble… ankaŭ la kulturdomoj Greziljono en Baugé, Kvinpetalo en Bouresse kaj krone la E-muzeo en Gray akceptis ĝojajn trejnadojn. Du specialaj banderoloj (unu vertikala, unu horizontala) kun la figuro de la giganto Naturamiko estis printitaj kaj akompanis La Kompanojn dum ilia preparturneo kun la dulingva slogano "Esperanto, giganta paŝo por la homaro".

Intertempe Yannick Dumoulin kreis la retejon de La Kompanoj (http://lakompanoj.free.fr) Tie eblas tute libere legi, aŭskulti kaj elŝuti la tekstojn, partiturojn, melodiojn, originalajn versiojn kaj prov-registraĵojn de ĉiu kanzono de la repertuaro. Tio ebligis al izolitaj volontuloj memstare lerni la kanzonojn, ne nur en Francio… Cento da printitaj broŝuroj kun la partituroj estis disvenditaj al mendintoj.

La granda rendevuo kun la Lilla publiko okazis lundon, la 27-an de Julio 2015 posttagmeze. La antaŭan tagon La Kompanoj ĝin rekte anoncis al la partoprenantoj de la 100-a UK dum la nacia vespero, kiu jam prezentis bukedon da kanzonoj el la repertuaro. Je la 14h jam granda grupo amasiĝis ĉirkaŭ la muzikantaj suzafono*, violono kaj gitaro de Bernard, Fransoazo kaj Pjero antaŭ la ekiro. Longa serpento ondumis dancetante kaj iris unue al la stacidomo kaj poste sur la larĝa trotuaro ĝis la teatroplaco. Tie aliaj geesperantistoj atendis. Malfacilas nombri la tre multnombran kunkantantaron. Simple sciu, ke la 250 ekzempleroj de la kanzonaro fulmrapide disdoniĝis. Se konsideri, ke averaĝe du kantantoj uzis la saman tekstaron, ĉu ĉirkaŭ 500 personoj kunĝuis la eventon? Ĉar ne nur esperantistoj sed ankaŭ atentemaj preterpasantoj scivoleme kaj/aŭ plezureme haltis ĉe tiu ne kutima animado: jen bona okazo kaptita por informi pri Esperanto! Kvankam la malfavora vetero (forta vento kaj pluvminaco) malebligis la antaŭviditan ĉeeston de la giganto Naturamiko kaj ĝenis la aŭdeblecon, ĉiu muzikanto kaj kunkantanto mem varmigis la etoson. Jam ĉe la unuaj notoj la grupego harmoniiĝis kaj ĝis la lasta kanto jen ŝerce, amuze, jen emocie, engaĝite laŭ la kanzono, ĉiuj sentigis siajn komunajn emociojn! Konstateble, la repertuaro estas pli facila por eŭropanoj, tamen ankaŭ aliakontinentanoj plezure plenvoĉe partoprenis. Dankon al ĉi tiu plej multnombra Kompanaro!

* Latuna blovinstrumento, speco de tubjo, kiun la ludanto apogas sur la ŝultro, por ebligi ludadon dum marŝado.



## ILI ĈEESTIS!...
## REAGOJ DE KELKAJ SPEKTINTOJ POST LA UK

**José Grammatiko (el Francio)**

Saluton Marcelo kaj Klodin',

Bonege la KD "Moriza". De post mia reiro mi aŭskultadas ĝin senĉese. Fartu bone, ĝis. José

**André Demarque (el Belgio)**

Karaj Kompanoj,

Ĉe la "Movada Foiro" dum la UK de Lillo la asocio, kiu plej interesis min estis "LA KOMPANOJ". Mi jam kopiis kelkajn kantojn el via retejo.

Por danki vin kaj kunlabori kun vi, mi proponas kanton, kiun mi esperanten tradukis. Temas pri la fama kanto "Amazing Grace". Vi elektis traduki francajn kantojn, sed estas almenaŭ unu angla kanto (*This land is your land*). Do…

Mi ne tro cerbumis pri la tradukado, ĉar tiu kanto valoras ne pro la paroloj sed pro la muziko. Kompreneble mi atentis, ke la akcento de la vortoj kongruu kun la akcento de la muziko. Se estas eraro en mia teksto, ne hezitu kontakti min, por ke mi korektu.

Mi «donacas» al vi la kanton *Mirinda Graco*. Se tio interesas vin, vi povas aldoni ĝin al via kantaro.

Salutas vin André Demarque

**Marie-Thérèse Lloancy (el Francio)**

Saluton kara Marcelo!

Mi profitas ĉi tiun okazon por plej forte gratuli vin kaj "La Kompanojn" pro tiu vere belega spektaklo en Lillo.

Kvankam mi mem minimume partoprenis la kunkantadon, mi insiste diras, ke ĝi havigis al mi multegan plezuron.

Plej amike, ĝis baldaŭ.

Marie-Thérèse






**Yoshie Kleemann (el Germanio)**

## Ni kune!

Dum la tuta kongressemajno mi pensadis, kiel en Lillo tiu kongreso sukcese funkciis: kun multaj sindonemaj kunlaborantoj. Ĉu pro la nacia historio kiam la franca popolo akiris liberecon en frateca kunlaboro kaj justeca sindonemo? Ĉiukaze unu el la plej surprizaj programoj estis la Nacia Vespero.

Sub la gvidado de Marcelo Redoulez la grupo «La Kompanoj» preparis por tiu vespero dum du jaroj selekton kaj tradukon de diverstipaj kantoj el regionoj en tuta Francio (unu giganta laboro), kaj dum unu jaro sekvis semajnfinaj ekzercadoj de dek ok kantoj en diversaj lokoj en Francio: Châlons en Champagne, Greziljono, Grey kaj Dijon, Limoges, Bouresse kaj aliaj lokoj. Tien venis pli ol ducent homoj.

Dum tiu Nacia Vespero tridek tri homoj laboris sur scenejo aŭ en la kulisoj. Giganto nomata Naturamiko bonvenigis la tutan kongresanaron kaj invitis la kantogrupon «La Kompanoj» sur la scenejon! Danke al projekciado de kantotekstoj sur ekrano multaj ĉeestantoj ankaŭ en salonoj Lapenna kaj Hodler povis kanti kune.

Sur la scenejo staris dekoj da kantistoj akompanataj de muzikinstrumentoj, gitaro, violono, akordiono, piano, kontrabaso, fluto kaj suzafono. Sed multaj ceteraj partoprenintoj de la kantostaĝoj dise sidis en la publiko kaj ili ne nur kantis sed ankaŭ kantigis la aliajn ĉeestantojn. Belega, grandioza atmosfero resonis en la tuta Zamenhof-Salono.

Same okazis ankaŭ tiu prezentado sur la Operej-Placo de Lillo meze de la urbo. Dank' al multaj publikaj informoj surstrate en tuta urbo (300 homoj? 400 homoj? tio tute ne gravas) tiom da homoj kune kantis.

Tia unika prezentado en tiu formo neniam okazis en antaŭaj Universalaj Kongresoj.

Tiun belegan senton, ni kune, ni longe, longe rememoros.



**Ronald Glossop (el Usono)**


Mi bone memoras la bonegan Nacian Vesperan programon de La Kompanoj dum la UK en Lille. Efektive mi opinias, ke tiu programo estas la plej bona, plej ĝuebla programo, kiun mi iam ajn spertis dum multaj UK-oj. Mi tre ĝuis la muzikon, kaj mi aparte aprezis la fakton, ke ni povis vidi sur la ekrano la vortojn de la diversaj folkloraj kantoj en Esperanto. Mi tre ŝatis tiun vesperon.

**El *Libera Folio* (**2015-08-11)

La jubilea UK laŭ miaj spertoj estis plena de surprizoj, kiujn mi ne atendis. Almenaŭ mi flaris ion novan surbaze de mia partopreno en pli ol dudek UK-oj. Ne nur estis rekonsciiĝo pri socipolitika eldiro de Zamenhof «homoj renkontiĝas kun homoj...» sed ankaŭ aktualaj kongresaj signaloj: Jam en la nacia vespero lunde(1) dum la entute perfekta prezentado, rigardinte fotojn de droniĝantaj fuĝintoj, senlaboraj ministoj, kontraŭrasismaj demonstracioj kun Angela Davis, la ĉeestantaro spontanee kaj kolektive ritme aplaŭdis. Similaj signaloj montriĝis en libroservo per la rapida vendo de la du libroj pri Krimeo, sed ankaŭ de la Komunista Manifesto. La esence socipolitika teatraĵo "Ursula" devis esti dufoje ripetata pro la grandega interesiĝo de la kongresanoj. [...] Ĉu ni volas iom pli refreŝigi la ideojn de nia majstro? "Homoj renkontiĝas kun homoj..."

Hans Konrad Eichhorn

(1) : Fakte dimanĉe (Noto de la redaktantoj)



**Ĵoakino Rosillo Vega Acosta (el Meksiko)**

Jen miaj impresoj pri La Kompanoj en la urbo Lillo...

Mi komencos per la unua tago, kiam okazis la Nacia Vespero, kaj mi havis bonŝancon partopreni ĝin en la Salono Zamenhof, kaj pro tio mi kaptis tre bonan lokon preskaŭ en la komenco de la vicoj, do mia rigardado al la tuta estrado estis perfekta.

Mi sidis kun mia patrino apude kaj la tempo alvenis, kiam estis la komenco de io nova kaj speciala, ĉar ĝi estas franca kaj verdire tio ja estas simbolo de paco, frateco, egaleco kaj libereco, sed samtempe temas pri la Jubilea evento por 100 UK-oj, do kio venos sekve?... mi scivolis kaj post nelonge mi jam konstatis kaj ĝuis ĝin.

Sed la vojaĝo prenis min dume, ĉar mi ekkonatiĝis kun mia nova natura amiko la Giganto de Villeneuve d'Ascq, kiu akceptis min tie en via bela kaj por mi fora lando, kaj tio estis la komenco por mi ekkonatiĝi kaj eniri en tiun novan atmosferon.

Jen tuj mi enamiĝis pri la historio de la giganto kaj unuafoje en mia vivo mi vidis lin :-) Iom post iom venis la muziko kaj la prezentado sur la ekrano, kiu vere gvidis min tra Francio kaj ankaŭ Flandrio; do estis interesa sperto ĉar vere la prezentado estis pli riĉa ol nur loka komuna afero, ĝi estis plenriĉa de la diversaj partoj de la lando kaj de tie ni vojaĝis kaj konatiĝis norden, suden, orienten, okcidenten, eĉ Flandrio ankaŭ aperis kaj eĉ partetoj de Roterdamo kaj Bruselo...

Sed tio kio vere impresis min estis la kvalito de la tuto, kaj ĉio estas la sumo de la aktoroj, tute profesiaj laŭ mia vidpunkto, la etoso, vestaĵoj kaj kostumoj, la prezentado mem, kaj nepre la muziko kaj la natura maniero, kiel vi ĉiuj kantis, aktoris kaj performis dum la prezentado, kaj mi estis kun unu okulo al la podio kaj alia okulo al la telefono, kie mi registris filmojn, ĉar kiam unu kanto finiĝis mi miris, ke la alia plaĉis al mi eĉ pli ol la antaŭa kaj vere tio surprizis min... Estis momento preskaŭ je la fino, kiam multaj homoj estis kune sur la podio, kaj la voĉaranĝoj kune kun la sento de la viva muziko tuŝis mian animon kaj eĉ larmo venis el miaj okuloj pro emocio.

Dank' al nia kara Zamenhof kaj nia neŭtrala Lingvo Internacia mi estas honorigita en mia vivo sperti tiun senton kaj senti min ankaŭ kiel parto de tio, kial? Ĉar mi sentis min vera Esperantisto!!!

Mi pli emociiĝis kiam S-ro Christer Kiselman, kiu estas la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, persone alte premiis mian novan naturamikon la giganton kaj donis al li la diplomon de Esperanto, vere mirinda momento, kiu tuŝis mian koron... ☺

Personajn gratulojn al ĉiu el vi, kiu partoprenis tion, inter aliaj al Pjero Libbrecht, Bernard Legeay, Marcel Redoulez, Pjer Buvje, Jean-Pierre Quiquempois, Brigitte Quiquempois, Fransoazo Noireau, Frambo Carrieu, Gilbert Darrieux, Flora Markov, Janine Dumoulin, Jean-Marie Deknudt, Isabelle Diaz, Morine Stride. Tre speciale al Fabrice Morandeau (FaMo), Claudine Pomirol, Yannick Dumoulin, Lucia Unia kaj ĉiuj kiuj deĵoris, teknikistoj, produktistoj, kreintoj de la ideo... vi vere estas Majstroj.

Mi ankaŭ lernis je la fino, ke tiu mirinda prezentado estis la rezulto de dujara laborado, vojaĝado tra la lando, kaj multe da tempo dum semajnoj kaj semajnfinoj por grupigi homojn kaj ekzerciĝi pri la tuto, sed la rezulto vere surprizis min kaj estos en mi dum la tuta vivo.

Kio pri la posta tago? Kiam mi eksciis, ke ni ĉiuj kuniĝu je la 2:00 posttagmeze ekster la kongresejo kaj kune iros al la Teatro-placo por kanti kun la grupo je la 3:00, mi diris al mia patrino, ke ni nepre devas profiti kaj ĝui esti en tiu karavano kaj akompani la grupon; kaj jes, sekvantan tagon ni jam grupe renkontiĝis ĉe la kongresejo kaj estis vera granda bela parado de Esperantistoj akompanantaj la francan muzikistan grupon; ni promenis tra la stratoj, preterpasis la belegan Lille-Flandres stacidomon kaj, iomete for, jam alvenis al la Teatro-placo. Kiam ni marŝis, homoj sur la strato miris pri nia karavano kaj aplaŭdis nin... ni profitis por informi ilin pri la Lingvo kompreneble, kaj jam ĉe la teatro la Kompanoj disdonis al ni la kantojn sur papero kaj ni kune komencis kanti, ĉiuj en unu sola voĉo. Tiu momento estis unuiĝo de Nacioj, reprezentantoj de niaj diversaj landoj de la tuta mondo, kaj kune kun unu sola sento pere de la alia Internacia Lingvo, kiu certe estas muziko, kaj ĉiuj bone kaj bele kaj entuziasme kantadis la belajn kaj novajn kantojn, kiujn ni ekkonis unu nokton antaŭe.

Mia persona impreso, vidinte la Nacian Vesperon, estas tre simpla, kaj mi povas diri ke ĝi estas "tute vere franca", ĉar por mi kiel fremdulo en Francio, pere de tio mi sentis, ke mi travivas kaj spertas la francan kulturon: manĝaĵoj, muziko, kostumoj, vestaĵoj, karakteroj kaj etosa animo, pere de la belaj ruĝaj koltukoj kaj francaj ĉapoj kaj ĉio ĉi unuiĝinta kun la sono de la grava granda trumpeto, akordiono, violono kaj fluto... kion alian mi povas peti? Ĉio jam estis tie kaj, mi ripetas, mi vere sentis kaj travivis ĝin tre franca.

Mi kore gratulas vin kaj prenas verajn belegajn momentojn en mian koron por ĉiam, mi estis tre impresita.

Se mi povas konsili denove, estis tro da laboro kaj la kvalito estas tiel alta, ke mi vere instigas vin pripensi kaj ne lasi la aferon tiel, bonvolu vidi, kiel vi povas produkti specialan DVD-on aŭ surbendigi la kanto-sonon sur kompakta disko, ĉar tio jam estas parto de nia Esperanto-kulturo. Kaj, mi estas tute certa, se iuj alilandaj

Esperantistoj, kiuj vidis la spektaklon persone dum la UK, vidus la DVD-on en la estonceco, ili certe aĉetus ĝin ĉar estas tre bela memoraĵo, kaj tiuj, kiuj maltrafis la spektaklon, povus ankaŭ ĝui kaj ne perdi la eventon, vidi kaj senti tion, kion mi ankoraŭ sentas.

Mi ankoraŭ havas la kanton *Lili* en miaj oreloj kaj mi estas tre feliĉa pro tio...

Kun multe da emocio mi el Meksiko salutas vin ĉiujn, kiuj legos tiujn ĉi impresojn.

Tre sincerajn pensojn, kaj mi alte taksas la eventon kaj gratulas al vi ĉiuj pri la grandega donaco al ni!...

Estas por ĉiam tre bela impreso por mia patrino kaj mi, ke ni kune povis ĝui kune... Dankon!!!






**El *Eŭropa Bulteno* Aŭgusto 2015, No 151**

La centa UK estis vere nekutima kaj memorinda aranĝo. Universalaj Kongresoj havas sian rutinon, sian klaran skemon kiun UEA sekvas jam dum jardekoj. Malgraŭ ĉiuj kritikoj, ŝajne tiu strukturo ankoraŭ kaptas intereson de sufiĉe multaj membroj de UEA kaj garantias sukceson. UEA ankaŭ ĉi-jare faris sian kutiman laboron korekte, organizis la programojn, aliĝojn, ekskursojn kaj tiusence ĝi ne estis aparta manifestaĵo. Sed kio la centan elstarigas estas la speciala engaĝiĝo de francaj esperantistoj, gastiganta E-movado. Sepcento da ili partoprenis en la Kongreso, same multaj kiom da kongresanoj estis en la 99-a UK entute. LKK kaj helpantoj: pli ol 200 personoj. La francoj manifestaciis forton de la sendube plej multnombra kaj organizita nacia movado en la mondo. La nacia vespero estis tre freŝa aranĝo. Komplete ĝin efektivigis la artistoj esperantistoj preskaŭ plenprofesie, evitante klasikajn folkloraĵojn kaj tamen prezentinte bonege la francan kulturon kaj kontribuon de francaj esperantistoj en ĝi. Dediĉinte gravan parton al fama belga franco Jaques Brel ili tiel brile prezentis ties verkon, ke eĉ la tradukoj resonis per la elstara funkcio de sono R en ties kantoj.

Eĉ pli ol la rolo de la francoj en la kongresa programo elstaris brila kaj modela malfermeco de ĉi tiu UK. Plej ofte oni ŝparas monon kaj ne multe uzas por reklami E-on ene de la urbo, ne montrante la aranĝon al la civitanoj. Nun estis escepto. Okazis brila prezento de iaspeca koncerto de francaj kantoj en Esperanto sur la placo antaŭ la teatro kie aliĝis multaj hazardaj pasantoj kaj kunkantis. Amase estis ĉie en la urbocentro dismetitaj afiŝoj, la loka gazetaro ĉiutage skribis artikolojn, radio kaj televido interesiĝis kaj elsendis, dank' al brila informa servo turnita al la ekstero. Simile brila estis la vizito de esperantistoj al Bulonjo sur Maro dum la ekskursa tago. En la teatro, kie okazis la unua kongreso antaŭ 110 jaroj, okazis solena konferenceto kun kvarcento da kongresanoj, poste oni solene malfermis novan memortabulon sub la Zamenhof-monumento ĉe la malnova stacidomo, post kio la centoj da esperantistoj promenis tra la urbo al la urbestrejo sur stratoj ornamitaj per E-flagoj kaj estis akceptitaj de la urbestro. Brila manifestaĵo publika. La urbo pro tiu okazo decidis fondi Esperanto-centron, al kiu oni dediĉis vilaon urbocentre.

Kaj fine al la imponeco de la kongreso kontribuis la 2700 kongresanoj el 80 landoj, kvanto jam de longe ne vidita en UKoj. Pri la centa la E-movado vere povas fieri.

Zlatko Tišljar



Surstrata kunkantado ĉe la Operejo,
lundon la 27an de julio

**Akademio de Esperanto**

La prezidanto, **Christer Kiselman**
Al ĉiuj membroj kaj korespondantoj de Akademio de Esperanto kaj al ĉiuj aliaj interesiĝantoj
Notoj verkitaj post la kongreso en Lille 2015

**2015-07-26: La Nacia vespero: transdono de diplomego al Naturamiko**

La Nacia vespero estis laŭ mi nekutime altkvalita. Ĝi havis la rubrikon «Brel inter la gigantoj» honore al Jacques Brel (1929–1978).

Mi estis invitita saluti sursceneje 4,3 metrojn altan giganton nomata Naturamiko (el la tradicio de la tieaj karnavaloj kaj lokaj festoj) kaj transdoni diplomegon en formato de 100 cm×75 cm. Mi transdonis la diplomegon kun kelkaj vortoj, proksimume tiuj ĉi:

*Kara Naturamiko; karaj kunlaborantoj de Naturamiko!*

*Mi tre ĝojas ke mi havas okazon renkonti vin. Eĉ pli mi estas feliĉa ke vi estas naturamiko kaj ne naturmalamiko! Imagu se estaĵo kiel vi estus naturmalamiko! Ĉiuj kiuj estas naturmalamikoj, levu la manon!* [Neniu faras.] *Vi vidas ke vi ne estas sola.*

*Nur unu averton mi havas: ju pli alta oni estas, des pli severe, des pli danĝere, estas fali. Tre atentu ke vi ne falas. Mi deziras al vi longan, feliĉan vivon sen ajna falo.*

*Pro viaj gravaj kontribuaĵoj al nia lingvo kaj al la esperanta kulturo, laŭ mi plej grava parto de nia komunumo, Akademio de Esperanto decidis doni al vi diplomegon kiel ateston pri via alta lingva kaj kultura nivelo.* [Mi legas la tekston de la diplomego.]

*Nun restas al mi nur unu problemo: kiel efektive transdoni ĝin? Tio okazos helpe de fizikaj rimedoj* [Marcel estis preparinta stangon, per kiu mi kun granda fortostreĉo sukcesis pendigi la diplomegon sur la brakon de Naturamiko, kiu estis... altnivela].



## KONKLUDE...

**La Kompanoj dum la 100a UK en Lillo.**

*Raportas Marcelo varme (!) en Lillo mem*

### Dimanĉon 26/07/2015: Rava nacia vespero

Por sia spektaklo *Granda Ĵak inter la gigantoj* La Kompanoj ricevis blindan fidon de la lokaj organizantoj por animi la tutan dimanĉan vesperon. Tiel ni povis libere krei specialan spektaklon kongruan kun la idealoj de nia trupo. Kompreneble nacia ne signifas naciista, kaj la simpla argumento pri la geografia situo de Lillo sufiĉis por facile komprenigi al la publiko, ke tiu vespero etendiĝos ankaŭ translimen. Krome la jubilea 100a UK ebligis aludojn al la historio de la movado kaj per la elektita repertuaro orientigon de la ĝenerala atmofero direkte al la «interna ideo».

La teknika preparado dum la posttagmezo estis tro longa. Tion bedaŭris ĉiuj: kaj la atendantaj Kompanoj, kaj la kelkaj teknikistoj speciale tiutaske dungitaj. Ni frontis krome al informadikaj konektoproblemoj, kiuj fine solviĝis. Nur Klodin' kaj Marcelo scias, ke kelkaj efiketoj malaperis. Ĉefe mankis plena respondeculo de la salono al kiu nin direkti por esprimi niajn dezirojn/postulojn. Sed dum julia dimanĉo tiu ĉi libertempis! Eble li ebligus kelkajn plibonigaĵojn. Tamen la ĉeestantaj teknikistoj, ĉiuj junaj, fine tre profesie sukcesis servi la spektaklon kaj altkvalite reliefigis ĝin kaj sone kaj lume!

Notindas, ke la ĉefa salonego Zamenhof (Vauban - 1500 sidlokoj) estis plenplena, kaj ke kvin kameraoj samtempe montris la spektaklon sur vastegaj ekranoj en du ceteraj salonoj Hodler kaj Lapenna (po 750 lokoj ankaŭ plenaj). Tie spektantoj volonte kantus pli se la paroloj aperus pli longe sur la ekrano, kaj rezignis aplaŭdi ĉiujn kanzonojn konsiderante ke fakte La Kompanoj ne aŭdas ilin. Ili sentis sin iom frustitaj. Ankaŭ mi pro tio.

La rekta publiko tuj de la komenco sekvis nin kaj jam de la unua kanzono *La esper' senlima* kunkantis. Ekde tiuj unuaj «lalalala» forte sentiĝis tiu apogo. Ĝi rolos dum la tuta spektaklo aldone al nia sursceneja kompliceco. De tiu komuna implikiĝo fontas la unua sukceso de nia prezentado.

Kompreneble la sinsekvaj partoj respektive ŝajnas mallongaj. La tradiciaj muzikoj povus vojaĝigi nin tra pliaj regionoj, Mor*I*za povus plie lirikumi, Janine kaj FaMo povus tremigi nin ankoraŭ pli dank'al Brelaĵoj kaj la bukedo povus ankoraŭ pli parfume flori. Sed spite al tiuj atestantoj, kiuj «volonte spektus du kromajn horojn», certas, ke ni elektis la taŭgan daŭron - 1 horon kaj 50 minutoj. Do ni vere plenumis nian promeson: por la 100a UK, 100-minutan spektakon (…plus la biso!)

Kiel jam spertite dum niaj pli fruaj spektakloj, komence restas en nia kapo nur la malbonaĵoj, kiujn ni persone misdiris, miskantis aŭ misfaris dum tiu ĉi aŭ ĉi tiu parto de la prezentado. Tamen ni sciu aŭdi la publikon kaj preni de tiuj multegaj postaj atestoj, kiel la ĉeestantoj aparte rave kunvivis tiun eventon.

Nur laŭdojn ni aŭdis jam tuj la post la prezentado kaj la morgaŭon. Tiujn laŭdojn vere ĉiuj Kompanoj samgrade meritas. Tiel bona rezulto ŝuldiĝas al la kolektiva sukceso. Ja elstaras la kantado de FaMo, kiu hirtigis la harojn sur miaj brakoj, tremigis mian spinon dum *Amsterdamo* kaj larmigis belginon dum *La Flandrinoj*. Ja elstaras la natura senzorga sursceneja moviĝado de Flora. Ambaŭ ili estas profesiuloj kaj jam de la komenco ili tiras nin, amatoroj, al tiu nivelo de prezentado, kiun esperantopubliko ne kutimas spekti. Ni aparte danku kaj gratulu ambaŭ ilin. Sed sen ĉiuj tridek ceteraj Kompanoj la spektaklo ne estus, kia ĝin ni montris! Ĉiu rolis sian neanstataŭeblan rolon. Ankaŭ Naturamiko. Ankaŭ Klodin' ĉe la komputilo. Ankaŭ Christer Kistelman, la prezidanto de la Akadenio, kiu tute ĝoja kaj emocia kiel infano nepre mem volis transdoni la diplomegon al Naturamiko definitive adoptita kiel nova esperantisto!

Xavier Dewidehem, prezidanto de la Loka Kongres-Komitato, atendis min post la prezentado por gratuli kaj danki al ni pri la tuto: la enhavo, la spirito, la kvalito de la prezentado… Li longe kaj detale revivis la spektaklon komentante plurajn scenojn kun granda emocio. Li estas la unua inter dudeko da atestantoj, kiu asertis, ke la nacia vespero de la 100a UK en Lillo elstaras inter ĉiuj aliaj, kiujn li jam spektis. Maljuna germanino eĉ samdiris post sia partopreno en kvardek UKoj! Kaj Christer dudek unu!

Ni rajtas fieri pro tiu atingita celo. La komentoj estis tiel multnombraj, ke ili ne povas esti nur komplezemaj. Sincereco fontas el la resenditaj emocioj de la dankintoj kaj gratulintoj. Ne nur geamikoj rekte venis al ni. Ankaŭ spontanaj kunĝuintoj. Jen per simpla frazo. Jen kun tuŝbezono per manpremo, kiseto aŭ frapeto sur la ŝultro. Jen per pli longaj argumentoj kun detaloj. Sed ĉiuj pozitivaj. Pli surprize por ni kompreneble, estas, kiam nekonatoj petis pozon por foto! Sed tio ebligis kelkajn kromajn interŝanĝojn.

La gratuloj ofte reliefigis la diversecon kaj la aktualecon de la elektitaj temoj. La publiko ŝatis la komikajn partojn sed ankaŭ alte aprezis la fortajn emociojn. Kiom da KDoj ni vendus se ni antaŭe produktus la bukedon? Almenaŭ tridekon oni petis de mi la morgaŭon. Por pluraj personoj la KD de Mor*I*za ne sufiĉas. Ja ili akiris ĝin, tamen ili volas pli. Kaj ankaŭ la DVDon de la spektaklo iuj petis. Sed kiam mi tre ĝentile provis komprenigi, ke verŝajne tio ne eblos, ili proteste kvazaŭpostulis ĝin, dirante, ke ni ne rajtas ne disponigi tiun valoraĵon, kiun ili volas montri ĉie ajn. Vere pluraj aktivuloj jam alproprigis al si la spektaklon kaj jam imagis, kiel ili uzos ĝin reveninte hejmen, jen ĉe sia loka klubo, jen ĉe radio, jen kiel propagandilon, jen kiel kursobazon…





Mi hodiaŭ matene (merkrede je la 6:50) plu koleras kontraŭ mi mem, ĉar mi ne kolektis la videoregistraĵon tuj post la spektaklo. La teknikistoj tiam pretis ĝin kopii. Sed mi ne tuj prenis la bezonatan USB-memorstangeton dum jam min vokis alia bezono kaj nek la morgaŭon, nek la sekvantan tagon mi sukcesis retrovi la videoteknikiston, ĉar la kongreso ne dungis liajn servojn dum tiuj tagoj. Mi devos atendi lian revenon vendredon, lasta tago de la kongreso. Mi nepre kaptu lin kaj kopiigu la filmon. Mi ĉagrenus, se ni, ĉiuj Kompanoj, ne povus post kelkaj semajnoj aŭ monatoj komune revivi tiun belan prezentadon niavice spektante ĝin.

Kompreneble neniu scias, kio okazos dum la venontaj monatoj. Mi sincere esperas, ke tiu aventuro por multaj el vi servos kiel stabila bazo por plu emi al kunkantado kaj teatrarto. Surstrate kaj sursceneje. Mi ankaŭ esperas, ke FaMo, Flora kaj Morine dank'al bonaj kontaktoj estos invitataj de multaj aranĝoj.

Mi mem jam delonge decidis, ke mi malpli zorgos pri esperanto dum la venontaj jaroj. Estos facile teni promeson, ĉar mi faris nur tion dum la du lastaj. Tamen mi engaĝiĝis kaj estas elektito kaj en nia vilaĝa konsilantaro kaj ĉefe por la sindikato SUD por defendi suferantajn kolegojn. Tial vi komprenu, ke mi dediĉos ekde septembro pli da tempo por tiuj taskoj.

Gigantajn dankegojn kaj gratulojn al La Kompanoj pro ilia neforgesebla spektaklo *Granda Ĵak inter la gigantoj* okaze de la nacia vespero de la 100a Universala Komgreso en Lillo la 26an de julio 2015.

**Lundon 27/07 2015 : Homamasa surstrata kunkantado**

Kvankam jam delonge anoncita, tiu programero ne aperas en la kongreslibro. La scivolemaj kongresanoj trovu ĝin sur aparta flugfolio, kiu prezentas ĉiujn aranĝojn malfermitajn al la Lilla publiko. Feliĉe ni tion antaŭvidis kaj la averta bildo kaj la anonco de Naturamiko dum la spektaklo (fine de Zaz) klare indikis la rendevuon.

Bedaŭrinde la venta kaj pluvminaca vetero malebligas al Naturamiko partopreni en tiu evento. Sed la entuziasmo ne mankas ĉirkaŭ la instrumentoj de Bernard, Pjero kaj Fransoazo jam antaŭ la akurata horo. Je la 14:00 granda nombro da geesperantistoj kunzumadas kaj petas la parolojn de la kanzonoj. Ili devas pacienci ankoraŭ iomete. Dek minutojn poste longa parado ekiras unue al la stacidomo Lillo-Flandrio, kie grupeto atendas nin kaj fine laŭ la rekta strato Faidherbe kun larĝa bonveniga trotuaro, la bonhumora bandego promenas ĝis la Teatroplaco antaŭ la operejo. Tie jam atendas nin aliaj kongresanoj. Sur ties ŝtuparo instaliĝas La Kompanoj. Muzikantoj kaj kerna kantanta trupo, kiuj instigos al kunkantado la nun ankoraŭ pli konstateblan grandan nombron da ĉeestantoj. Kiom da? Mi provis kalkuli sed ne sukcesis. Eĉ ne taksi.

El la valizo (dankon Pejo) mi eltiras centon da ekzempleroj de nia kanzonaro klarigante, ke ni donas unu por kvar kunkantontoj. Komplezeme la etenditaj manoj jese respondas sed jam ne sufiĉas la stoko kaj mi tuj disdonigas kroman kvindekon. Post la dua kanto, pliajn.

La historio de Esperanto riĉas je kunkantado kvazaŭ la esperanta komunumo pli kantemus ol aliaj homogrupoj. Tamen FaMo kiel mi bedaŭre konstatis, ke de kelkaj jaroj, tiun riĉaĵon la nunaj esperanto-eventoj, -aranĝoj pretus forlasi. Nepre ni savu tiun popolan kulturon!

Jam antaŭ la 15:00 (anoncita horo) laŭtiĝas la esperanto-versio de la elektitaj famaj francaj kanzonoj. Nedubeble la sukceso de la spektaklo en la antaŭa vespero konvinkis la publikon alfronti la ne tro favoran veteron. Sed krome la kunkantantoj ne hezitas paroli ankaŭ pri spektaklo, kiam ili rakontas pri tiu dua prezento de la kanzonoj. Rande de la kantanta esperantistaro, kelkaj logitoj estas invitataj kunkanti kaj informataj pri Esperanto kaj ties movado. Ne nur de organizantoj, sed ankaŭ Klodin', Morine kaj Pejo bone efikas tiurilate.

Kiam ni rekantos dum la semajno? Plurfoje mi reaŭdis tiun demandon post la fino de tiu festo nia. Aŭ kie ni kunkantos morgaŭ? ĵaŭdon? Eble La Kompanoj ne sufiĉe bone preparis sian semajnon. Almenaŭ mi mem tute ne iam ajn imagis tiajn sukceson kaj sekvodezirojn.



Lundon, la bandego tra la lillaj stratoj… kaj la giganta homamasa kunkantado











Vendredon, La Kompanoj kun Kajto





## ANEKDOTOJ

### La partituroj

Muriel aranĝis ĉiujn partiturojn per la programo Musescore. Kredu al mi, ŝi multe ŝvitis por plenumi tiun gravegan laboron. Mia aserto fontas el la kelkaj horoj, kiujn mi pasigis provante helpi al ŝi per tiu libera programo ankoraŭ ne tute fidinda… kaj la dua versio ne korektis ĉiujn malbonaĵojn de la originala programo. Tamen Muriel diligente lokis ĉiujn notojn, muzikindikojn kaj tekstojn, kaj laŭnecese korektis kaj eldonis variantojn por la suzafono! Dankegon al ŝi pro tiu malluma laboro, sur kiu baziĝas ĉies cetera provado!

### La retejo

Yannick kreis la retejon de La Kompanoj cele al disponigo de la tekstoj, partituroj kaj registraĵoj. Jam de la komenco de la projekto Fabrice esprimis tiun sopiron. Gratulojn al Yannick pro la starigo de tiu plaĉa retejo. Tre praktika ĝi efektive ebligas al izolitaj esperantistoj, francaj aŭ ne, ekkoni la kanzonojn. La individuaj preparadoj ebligis al la estonta kerno dise loĝi kaj al eksterlandaj vojaĝontoj laste kaj aktive aliĝi al la trupo sur la Lilla teatro-placo. Multaj, kiuj vizitis la retejon samopinie gratulis. Ili elŝutis: jen pruvo de la reteja efiko!

### La musanekdoto

Ĉiu kantanto sur la scenejo scias pri la grava rolo de Betty. Kvankam ja ĉiu devis parkeri la kanzonojn, la streso pro «memortruo», «blanka paneo» maltrankviligis multajn. Sed Betty musklakadis ekde la staĝo en Bouresse en junio. Tie ŝi efektive montris sian lertecon por dompti tiun beston, kiu helpegis kiel suflorsavanto.

Kelkajn tagojn post tiu junia staĝo Marcelo maltrankviliĝas: malaperis la museto! Speciale akirita malgranda, diskreta museto. Ĉu ĝi forfuĝis? Betty asertas, ke ne, ŝi ne forrabis sian novan amikinon. Do Marcelo mem kulpas, ĉar li ne kontrolis, ke li ĝustaloke enpakis ĝin fine de la lasta provaĵo en Kvinpetalo. Tial li devas akiri novan muson… Sed akireblas tiam nur pli granda, blanka, do malpli diskreta. Ni bezonas ĝin. Rezigne Marcelo tamen akiras ĝin. Kaj ĝi rolas sian bonan efikon dum la lasta preparado de la Kompanoj en Artigo. Betty ja domptis ankaŭ ĝin!

Sed kial ĝin Betty ne uzos sur la scenejo en Lillo? Tute simple ĉar unu horon antaŭ la komenco de la spektaklo, la kaŝiĝema nigra museto subite reaperas! Neniu vidis ĝin antaŭe. Neniu scias, kiel ĝi sukcesis trankvile kuŝi apud la komputilo. Kvazaŭ ĝi sola elsakiĝis… ĝustatempe por la spektaklo, kiel stelulino!

Marcelo



Morine, Betty… kaj la muso!

## LA GIGANTOJ

### De kie ili devenas?

Malfacilas ekzakte precizigi originon de la gigantoj kaj ties karnavalaj paradoj. Ilia historio ligiĝas kun la popolaj legendoj kaj fontas el rakontoj pri bibliaj sanktuloj kaj herooj de la mitologio. La unuaj pupegoj el vimeno probable ekaperis unue en religiaj procesioj.

En Nordio eblas trovi unuajn menciojn pri ili jam en la 16a jarcento en urboj Dovajo (Douai) kaj Dunkirko (Dunkerque), dum spuroj ekzistas en Portugalio jam de la 13a jarcento, kaj de la 15a jarcento en belgaj provincoj. La procesiaj gigantoj iom post iom iĝas karnavalaj gigantoj. Ili reaktualiĝas dum la 19a jarcento dank' al la ĉevalĉaraj festoj prezentantaj grandajn eventojn de lokaj historioj.

Laŭ la tempo la signifo de tiuj figuroj ŝanĝiĝas. Hodiaŭ ili fontas el loka historio, aŭ regiona metio (fiŝisto, bakisto, hakisto, kantisto, k.a.), kaj iĝis simboloj de regiono, urbo, kvartalo, asocio, homgrupo. Aktuale nombreblas pli ol 500 gigantojn en norda Francio, ĉirkaŭ 1500 en Belgio kaj 2000 en Katalunio.

### La gigantoj, popola arto!

Komence, ĉe nask(iĝ)o de giganto, ĉiam impulsas revo kaj volo de homgrupo. Ĝi fariĝas vivanta simbolo de tiu grupo kaj kontribuas re- kaj/aŭ plu-vivigi ties kolektivan memoron kaj sociajn rilatojn. Ĝi trovas sian lokon dum ties festo, kiu fariĝas la festo de la giganto.

La gigantoj socie vivadas! Post sia naskiĝo, giganto povas esti civile laike baptita en ĉeesto de siaj bapto-gepatroj. Gigantoj geedziĝas kaj naskas gigantajn idojn. Ili krome invitas sin por dancadoj kaj animadoj de la stratoj. Ili vojaĝas. Ĉiujn tiujn eventojn akompanas grandaj novaj internaciaj festoj!

La gigantoj ĉiuj malsamas. Plej ofte ili staras sur vimena stukturo. Por la kapo kaj la manoj estas uzitaj gipso, kartona pastaĵo aŭ poliestera rezino por la plej modernaj. La gigantoj estas aŭ portitaj (plej ofte de unu ĝis ses personoj laŭ la grandeco kaj pezo -eksterordinare la 14m-altan giganton el Nieuport en Belgio portas 24 portantoj!), aŭ puŝitaj sur propraj radetoj, aŭ starigitaj sur ĉaroj. Multegajn laborhorojn deĵoras tuta skipo por krei belan giganton.



Muntado de la giganto Naturamiko



**La giganto *NATURAMIKO***

Kadre de la preparado de la nacia kongreso de sia franca federacio, paske de la jaro 2012 en Gravelines (59- Nordio), la lillaj naturamikoj ekdeziris krei giganton. La konstrulaboroj komenciĝis komence de februaro 2010 kaj finiĝis en aprilo 2011. Dum pluraj sabatoj dudeko de plenkreskaj volontuloj kaj tri infanoj laŭvice mobiliziĝis por konstrui la giganton, formi, kolorigi kaj vesti ĝin. Sume pli ol 500 laborhoroj necesis. Ĝia strukturo kaj vestaro konsistas nur el reuzitaj materialoj!
Ĝin oni nomis *NATURAMIKO* ekde januaro 2012.

En aŭgusto 2012 okaze de la 100jariĝa jubileo de la Internacia Asocio de la Naturamikoj en Strasburgo ĝi promenis laŭlonge de la rivero Rejno ĉe la ponta pasejo de la du bordoj.

Naturamiko estis oficiale baptita en la plenaera muzeo de Villeneuve d'Ascq (ĉe Lillo) en junio 2013. Liaj baptogepatroj estas Pierre DEGEYTER (giganta figuro de la komponisto de *La Internacio*, kiu tie naskiĝis) kaj EPONA (keltgaŭla diino de fekundeco).

Naturamiko kunanimis la frankofoniajn festojn en Normandio (14- Houlgate) en majo 2014, la lokajn festojn de Fives en Lillo en junio 2015… kaj ĉefrolis dum la inaŭgura nacia vespero de la 100a Universala Kongreso de UEA en Lillo la 26an de julio 2015!

Brigitte kaj Jean-Pierre



Elstare dum la solena fermo (malantaŭ la prezidanto de UEA, Mark Fettes)




Naturamiko sursceneje kun la Kompanoj

## Les Amis de la Nature au 100ème Congrès mondial d'Espéranto

Saluton (bonjour), je m'appelle NATURAMIKO, ce qui signifie en espéranto « Ami de la Nature ».

Vous m'avez peut-être rencontré en 2012 à Gravelines pour le Congrès national des Amis de la Nature ou à Strasbourg pour le centenaire de la Fédération française des AN ou à l'occasion de mon baptême civil qui s'est déroulé au Musée de Plein Air à Villeneuve d'Ascq en 2013 ou à Houlgate lors des rencontres francophones de 2014. On me voit de loin car je mesure 4m41. Je suis toujours transporté en van par Jean-Marie Regnault qui veille à ce que je ne me blesse pas en route.

Cette année, j'ai été invité à participer au 100ème Congrès mondial d'Espéranto qui s'est déroulé la dernière semaine de juillet à Lille Grand Palais. Ce lieu a été choisi car le 1er congrès mondial d'espéranto a eu lieu à Boulogne sur Mer.

Quel est le lien entre les Amis de la Nature et l'espéranto ? Tout simplement, parce que traditionnellement, il y a eu des Amis de la Nature espérantistes, car l'intérêt de cette langue est de pouvoir rencontrer et communiquer facilement avec des gens de tous les pays. Ne serait-ce pas dans nos valeurs et/ou nos statuts ?

C'est donc Marcel Redoulez, espérantiste et Ami de la Nature de Niort qui a traduit en espéranto des chansons françaises connues. Au cours de plusieurs stages à travers la France, dont Châlons-en-Champagne organisé par Maryvonne Rincent, la KOMPANOJ et les AN ont appris ces chants pour pouvoir les chanter devant l'Opéra de Lille où je devais me rendre, si le temps le permettait. Les paroles étaient distribuées pour faire participer un maximum de personnes de passage.

Et puis Marcel a préparé la soirée d'ouverture du Congrès sur le thème : « Jacques Brel, un géant parmi les géants ». Il m'a invité à monter sur scène !!! Une première pour moi. La scène était très vaste. Mon papa et ma maman veillaient sur moi. Yannick, lui, était ma voix et grâce à Jean-Marie Deknudt, notre président régional, j'ai évolué sur scène pendant que Famo ou Janine interprétaient avec brio des chansons de Jacques Brel. C'était très très émouvant.

Puis j'ai reçu des mains du Président de l'Académie d'espéranto mon diplôme d'espéranto. J'étais très fier. Quel honneur !

Ensuite nous avons chanté les chansons préparées ensemble et le public a pu chanter aussi car les paroles étaient projetées sur l'écran. Le public a beaucoup apprécié et nous a beaucoup applaudis. J'ai appris par la suite qu'il y avait 3 amphithéâtres remplis, soit 3000 spectateurs !!! Inutile de vous dire que lorsque je suis revenu dans le hall d'entrée, j'ai été beaucoup photographié par les 2600 congressistes venus de 82 pays différents. Maintenant je continue à voyager, en photo... Quelle aventure ! Je m'en souviendrai longtemps avec tant de bons souvenirs, de rencontres amicales, d'ouvertures vers de nouveaux horizons !



Kun FaMo kaj Pjer… provlude antaŭ la spektaklo.



Ja kantas mi!... kun Flora kaj Marcelo.





Jean-Marie, miaj «piedoj», Brigitte kaj Jean-Pierre, miaj karaj gepatroj… kaj mia voĉo, Yannick.

# ESTRARO
# de
# « ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * * * * * *

Centre Culturel  Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux

* * * * * * * * * *

<u>Prezidanto</u>:  **Bernard SARLANDIE**
24, rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN
Tel: 06 83 29 40 13 / bernard.sarlandie@gmail.com

<u>Sekretariino</u>: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes  17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

<u>Help-sekretariino</u>: **Morine STRIDE**

<u>Kasistino</u>: **Monique DUSSENTY**
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel: 05 56 06 74 49 /  monique.duss@free.fr

* * * * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al la sekretariino aŭ al:
Yannick DUMOULIN —> yannickdum@free.fr